

PREĜADO

Nepre parto de la vivo de kredantoj estas preĝado, kiu estas interparolo inter ni kaj Dio. Ni esploru tion, kion la Biblio instruas pri tio - kiam, kie, kiel kaj pri kio ni devas preĝi.

Kiam Preĝi

Paŭlo skribis, ke ni preĝu 'senĉese' (1Tes.5:17) kaj Jesuo diris, ke oni devas ĉiam preĝi kaj ne laciĝi (Lk.18:1). Tio signifas, ke ni povas preĝi iun ajn momenton, ne gravas kiam. Ne necesas ĉesigi tion, kion ni faras; ne necesas halti se ni piediras; ne necesas atendi ĝis ni estas solaj; la plej grava afero estas paroli al Dio kiam ajn necesas. Neĥemja, kiam li estis en danĝera situacio antaŭ potenca reĝo, preĝis tuj, urĝe, rapide kaj silente (Neh.2:1-5).

Povas esti utila elekti taŭgan horon por niaj ĉiutagaj preĝoj, ekzemple frumatene aŭ antaŭ enlitiĝi, sed ni ne limigu nin al tiu okazo. Dio volas, ke ni alproksimiĝu al Li iam ajn, kiam ni deziras. Tiu vorto de Paŭlo 'senĉese' ne signifas, ke ni parolu la tutan tempon, sed, ke ni ne forlasu la malfermadon de niaj koroj al Dio.

Kie Preĝi

Multaj homoj pensas, ke ili povas preĝi nur en preĝejo, sed kial? Dio '*ne loĝas en manfaritaj temploj*' (Ag.17:24). Dio estas ĉie kaj povas aŭdi nin kie ajn ni estas - Li ja scias tion, kion ni intencas diri (Ps.139). En la Biblio ni povas legi, ke homoj preĝis en diversaj lokoj - kampo, malliberejo, ŝipoj, la interno de fiŝo ... Jesuo kutime iris sur monteton aŭ en dezertan lokon, ĉefe por eviti la homamasojn (Mk.1:35; 6:46 ktp).

Pri kio preĝi

Paŭlo skribis '*... pri ĉio, per preĝo kaj peto kun dankesprimoj, viaj deziroj sciiĝu al Dio*' (Filip.4:6). Dio jam scias niajn pensojn kaj problemojn; ni ne povas kaŝi ion de Li, do ni povas paroli al Li pri io ajn, petante helpon kaj gvidon. Preĝo ne estas nur petado; ĝi devas enhavi ankaŭ dankesprimon, ĉar Dio donas al ni ĉion, kaj ni povas doni al Li nenion krom adoro. Tiun adoron ni montras ĉefe per laŭdo, kiu estas elkora dankesprimoj.

Kiamaniere preĝi

Paŭlo konfesis ke '*ni ne scias kiel preĝi dece*' (Rom.8:26), tial nepre necesas, ke ni alproksimiĝu al Dio humile. Ni ne rajtas postuli ion. '*Dio estas en la ĉielo, kaj vi estas sur la tero; tial malmultaj estu viaj vortoj.*' (Pred.5:2) Jesuo avertis nin ne esti kiel hipokrituloj, kiuj '*... supozas, ke ili estos aŭskultitaj pro sia multvorteco.*' (Mt.6:5-8; Lk.18:9-14) Jakobo skribis, ke '*petego de justulo multe efikas*' sed, ke se ni petas

malprave, ni ne ricevos (Jak.5:16; 4:3). Johano simile skribis, ‘... *se ni ion petas laŭ Lia volo, Li nin aŭskultas*’ (1Jn.5:14-15). Jesuo instruis, ke ni preĝu en lia nomo (Jn.14:13-14; 16:24)

Ĝis nun do, ni eltrovis, ke ni povas preĝi iam, ie kaj pri io ajn, sed ni devas fari tion humile, laŭ la volo de Dio kaj en la nomo de Jesuo. Ni la plej bone lernos per legado de la preĝoj de justuloj troveblaj en la Biblio. Jen sep, kiuj elstaras:

Ĥana - 1Sam.2:1-10

- preĝo plena de dankesprimo kaj laŭdo pro la benoj de Dio

David - ĉiuj el liaj psalmoj estas preĝoj sed grave estas Psalmo 51

- elkora konfeso de peko kaj petego por pardono

Jona - Jona 2:1-9

- petego por helpo sed ankaŭ dankesprimo, citante kelkajn Psalmojn ekz. 42:7; 31:22; 5:7; 69:1-2,13-18; 50:14; 66:13; 116:17-18

Daniel - Dan.9:2-19

- konfeso de la pekoj de la popolo kaj peto por la plenumo de Diaj promesoj

Neĥemja - Neĥ.1:4-11

- konfeso de la pekoj de la popolo kaj peto por helpo, citante la preĝon de Daniel

Maria - Lk.1:46-55

- laŭdo kaj dankesprimo, citante la preĝon de Ĥana

Jesuo - Jn.17

- petoj por la plenumo de la celon de Dio, la unuecon de la kredantoj tutmonde kaj, ke Dio gardu ilin kontraŭ malbono.

Krom tio kaj kelkaj aliaj el liaj preĝoj, Jesuo donis al la disĉiploj, laŭ ties peto, ekzemplan preĝon. (Mt.6:9-13; Lk.11:1-4) Tio estas vaste konata sed ne tre ĝenerale komprenata:

Patro nia, kiu estas en la ĉielo

Nia Dio estas la Eternulo, ‘... *la Plejalta kaj Plejsupera ...*’ (Jes.57:15), ‘... *fajro konsumanta ...*’ (Heb.12:29). Sed Jesuo ĉiam parolis pri Li kiel “Patro”, kaj instruis, ke ankaŭ disĉiploj tiel alparoli Lin. Ni ne preĝas do, al iu abstrakta ‘dio de la naturo’ aŭ ĉiea nepersona energio. Ni preĝas al persona estaĵo, kiu forte rilatas al Sia kreitaĵo, dezirante, ke ni fidu al Li. Kvankam “en la ĉielo” Li estas ĉie per Sia spirito; neniu povas sin kaŝi de Li (Ps.139:7-12).

Kiel kreinto de ĉio Dio estas iusence patro de ĉiuj homoj, sed Jesuo estas unike Lia Filo pro sia naskiĝo (Lk.1:35). Li alparolis Dion kiel “Aba, Patro” (Mk.14:36), kiu estas intima, familia vorto kiel “Paĉjo”. Nun, pro la ofero de Jesuo, ankaŭ ni povas fariĝi filoj de Dio en aparta senco ĉar ‘... *al ĉiuj, kiuj lin (Jesuo) akceptas, li donas la rajton fariĝi filoj de Dio, al la kredantoj al lia nomo, kiuj naskiĝis ... el Dio*’ (Jn.1:12-13) Ni povas esti adoptitaj en Lian familion, fariĝante filoj de Dio per fido kaj bapto en Kriston (Gal.3:14-15).

Via nomo estu sanktigita

Kvankam Dio volas, ke ni pensu pri Li kiel patro ni devas memori, ke Li estas sankta, dum ni estas pekantoj. Kiam ni preĝas, ne grave kie, ni staras sur tero sankta (El.3:5). Ni devas adori Lin ‘... *akcepteble, kun respekto kaj pia timo ...*’ (Heb.12:28) En la hodiaŭa etoso de egaleco kaj kamaradeco homoj tro facile forgesas tion. La nomon de Dio oni maluzas ĉiutage, sed tra la tuta Biblio, multfoje ni legas ekz. ‘... *ne malbonuzu la nomon de la Eternulo...*’ (El.20:7); ‘... *gloran kaj timindan nomon ...*’ (Read.28:58); ‘... *oni gloru Vian grandan kaj timindan nomon ...*’ (Ps.99:3); ‘... *memorigu, ke Lia nomo estas alta ...*’ (Jes.12:4). Dio diris, ke tiuj, kiuj respektegas Lian nomon estos Lia ‘*aparta trezoro*’ (Mal.3:16-17)

Jesuo diris, ke li gloris Dion plenuminte Lian volon (Jn.17:4). Ni do, devas sanktigi la nomon de Dio ne nur per vortoj sed ankaŭ per agoj, obeante Liajn ordonojn.

Venu Via regno, plenumiĝu Via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero

Ĉu ni povas peti tion se ni ne komprenas kio estas tiu regno? Kaj la Malnova kaj la Nova Testamentoj instruas, ke Dio sendis la Sinjoron Jesuo por starigi la regnon de Dio sur la tero. Tiamaniere la volo de Dio plenumiĝos sur la tero same kiel ĝi nun plenumiĝas en la ĉielo. Nuntempe la mondo estas en stato de ribelo kontraŭ Dio, sed ne por ĉiam. ‘*En la tempo de tiuj reĝoj, Dio de la ĉielo starigos regnon, kiu neniam detruigĝos, kaj ĝia reĝado ne transiros al alia popolo; ĝi frakasos kaj detruos ĉiujn regnojn, sed ĝi mem staros eterne.*’ (Dan.2:44) Jesuo estos la reĝo de tiu regno. ‘*La regno de la mondo fariĝos regno de nia Signoro kaj de Lia Kristo; kaj li reĝos por ĉiam kaj eterne.*’ (Apok.11:15)

Kiam do ni diras “Venu Via regno” ni petas, ke Dio plenumu tiujn promesojn. Sekvas, ke ni mem devas deziri fari Lian volon. Eĉ Jesuo devis cedi sian propran volon por fari la volon de Dio. Li diris ‘...*plenumiĝu ne mia volo sed Via.*’ (Lk.22:42), tiel montrante sin inda regi la mondon.

Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ

Pano signifas la rimedon vivi. Dio scias tion, kion ni bezonas, sed petante tion ni agnoskas, ke ĉio venas de Li. Sed la Biblio instruas, ke *‘ne per la pano sole vivas homo, sed per ĉiu vorto de Dio.’* (Read.8:3) Ni bezonas spiritan nutraĵon ĉiutage same kiel la naturan. Por vivi ni bezonas la spiritan panon, la vorton de Dio, kiu estas lumilo por niaj piedoj kaj lumo por nia vojo (Ps.119:105) en kiu ni lernas pri Jesuo, kiu sin nomis “la pano de vivo” (Jn.6:35).

Pardonu al ni niajn ŝuldojn (pekojn), kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj

Antaŭ Dio ĉiuj el ni estas kulpaj; ni ĉiuj bezonas pardonon (Rom.5:12). Sole per Jesuo ni povas ricevi pardonon, kiel Petro diris, *‘... en neniu alia estas savo; ĉar ne estas sub la ĉielo alia nomo ... per kiu ni devas esti savitaj.’* (Ag.4:12)

Ĉu ni plene komprenas kiaj estas niaj pekoj? Eble ni pensas precipe pri la malĝustaj vortoj, agoj kaj pensoj, sed egale ni pekas kiam ni preterlasas tiujn agojn kaj vortojn, kiujn vi devus fari. Kiam Jesuo parabole priskribis la juĝan tagon en Mt.25 li kondamnis tiujn, kiuj staris maldekstre pro tio, kion ili ne faris - *‘vi ne donis al mi manĝaĵon ...’*

Jesuo ankaŭ avertis, ke krom se ni pardonas aliajn, ni mem ne ricevos pardonon: *‘...se vi ne pardonas al homoj iliajn kulpojn, via Patro ankaŭ ne pardonas viajn kulpojn.’* (Mt.6:15) Plue, se ni pensus, ke iu homo ŝuldas al ni tro multon por esti pardonita, alia parabolo tre forte montras, ke nia ŝuldo al Dio estas ege pli granda ol iu ajn, kiun alia homo povus ŝuldi al ni (Mt.18:24-35).

Ne konduku nin en tenton

Ŝajnas esti problemo en tio: ĉu Dio tentas nin peki? Nepre ne! Dio ja provas nin sed Li ne tentas. Jakobo diras *‘Neniu diru, kiam li estas tenata; Mi estas tentata de Dio; ĉar Dio ne estas tentebla de malbono, kaj Li mem tentas neniun; sed ĉiu estas tentata, kiam li estas fortirata de sia dezirado.’* (Jak.1:13-14) Kiam ni preĝas *‘Ne konduku nin en tenton’* ni petas, ke Dio gardu nin kontraŭ iu tento, kiun ni ne povas rezisti. Tro facile ni emas konduki nin en tenton. Li scias nian malfortecon, tial ni bezonas peti, ke Li detenu nin de iu situacio, kiu povus pekigi nin. Paŭlo skribis *‘Dio ... ne lasos vin esti tentataj super via forto; sed kune kun la tento ankaŭ faros la forkurejon, por ke vi povu ĝin elporti.’* (1Kor.10:13)

Liberigu nin de malbono

En la Biblio malbono ne estas peko; ĝi estas la sekvo de peko. Dio diris ‘*Mi ... faras pacon kaj estigas malbonon ...*’ (Jes.45:7). Dio ne pekas, sed Li estigas malbonon kiel puno pro peko. La mondo pleniĝas de malbonaj homoj kaj cirkonstancoj, kiujn ni ne povas eviti, sed Jesuo preĝis por ni: ‘*Mi petas, ne ke Vi forigu ilin el la mondo, sed ke Vi gardu ilin kontraŭ la malbono*’ (Jn.17:15). Ni ne forgesu ankaŭ, ke ‘*... malbonoj elvenas de interne, kaj profanas la homon.*’ (Mk.7:23) Paŭlo konsciis pri tio, konfesante ‘*Kiam mi volas fari bonon, la malbono estas ĉe mi.*’ (Rom.7:21) Nur per Jesuo nia savanto ni povas liberiĝi de tiu pekema naturo. (Rom.7:25)

La kutima finaĵo **Amen** signifas “veron” kaj indikas konsenton al la preĝo.

Multaj homoj ĉiutage ripetas tiun preĝon sed kiom el ili vere komprenas tion, kion ili diras? Se ne, la preĝo estas nuraj vortoj. Paŭlo instruis, ke ni preĝu “spirite” kaj “intelekte” (1Kor.14:15); nuraj vortoj efikas malmulte. Dio donis al ni Sian vorton por ke ni lernu pri Li, tiel konstatante kiel preĝi.

‘Nur tion Mi rigardas: humilulon kaj spirite-afliktiton, kiu respektegas Mian vorton.’
(Jes.66:2)

Sume oni povas diri, ke ju pli ni lernas pri Dio, des pli ni konstatas kiel preĝi. Pro tio, ke Li jam scias niajn pensojn ni povas mense paroli kun Li ĝis nia tuta vivo fariĝos ĉiama komunikado kun Li. Grave estas ankaŭ, ke ni estu pretaj aŭskulti Lian respondon. Kvankam ni ne aŭdas Lian voĉon ni povas esti certaj, ke ni ricevos ian respondon, ĉu per pensoj, kiuj venas en nia menso, aŭ ion, kion ni legas aŭ aŭskultas. Se ni pretas akcepti tion en fido, Dio ja povas nin helpi. Se iu sentas sin kulpa kiam la pensoj vagadas dum preĝado, tiu ekpensu, ke eble Dio tiel donas la respondon, gvidante niajn pensojn.

‘... la okuloj de la Eternulo estas turnitaj al la piuloj, kaj Liaj oreloj al iliaj krioj ...’
(1Pet.3:12).

Jean Field